

# Esperanto kaj UN

## Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 69, marto-aprilo 2024



Universala Esperanto-Asocio

## Brazilo, Ĉinio, Togolando, Germanio: Superrigardo de lastatempaj Esperanto-aranĝoj

Fortaleza, **Brazilo**, estis la rendevuo, en novembro 2023, de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis ducento da homoj el diversaj lokoj en Norda kaj Suda Ameriko, inter ili la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio d-ro Duncan Charters.

Em decembro, Prezidanto Charters vizitis **Ĉinion** por festi la dekan jubileon de la Esperanto-Muzeo en la Universitato Zaozhuang. La februara numero de la revuo *Esperanto*, organo de UEA, enhavis raporton pri la vizito, kaj ankaŭ pri la renkontiĝoj de d-ro Charters kun funkciuloj de la Ĉina Esperanto-Ligo, en Pekino. Aperis en la revuo ankaŭ raporto pri la utiligo de Esperanto kiel enkonduko al lingvolernado por la 1400 gelernantoj de la elementa lernejo Baiyangŝujie, kaj resumo de la festado de la Homrajta Tago en Ŝenjang, bazita je la ĉiujara mesaĝo de UEA pri homaj rajtoj, publikigita en tiu tago.

Homrajtan Tagon oni festas en UN la 10-an de decembro. La 15-a de decembro estas bone konata al la parolantoj de Esperanto kiel la naskiĝtago de la fondinto de la lingvo Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof. En la Esperanto-movado oni ofte markas la du festojn kune, kaj rilataj aranĝoj etendiĝas, kiel raportis la februara revuo, tra kelkaj tagoj. En la ĉefurbo de **Togolando**, Lomeo, ekzemple, speciala Tago de Esperanto-Kulturo estis festata la 16-an de decembro en la Universitata Centro Sankta Johano, kun ekskursita tago la 17-an de decembro por togolandaj partoprenantoj kaj vizitantoj el najbaraj landoj.

Krome, la revuo raportis pri tradicia Novjara festo organizita de Germana Esperanto-Asocio. Ĉijare la aranĝo okazis sur la insulo Norderneo, **Germanio**. Inter la parolantoj estis la iama germana ambasadoro al Rusio Ulrich Brandenburg, kaj Profesoro pri Astrofiziko de la Hebrea Universitato, Jerusalemo, d-ro Amri Wandel. Samkiel en Brazilo kaj Togolando, ĉiuj kunvenoj okazis en Esperanto.

## La Tago de la Gepatra Lingvo estis vaste festata de Esperanto-parolantoj

En forte vortumita deklaro eldonita de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-an de februaro, UEA donis sian apogon al la alvoko de Unesko pri instruado en la gepatra lingvo kaj pri multlingva edukado je ĉiuj niveloj, kune kun interkultura edukado. "Lingvoj estas la absoluta fundamento de kompreniĝo kaj kunlaboro" deklaras la

mesaĝo de UEA. “Lingvaj rajtoj rilatas rekte al demokratio kaj vera komuna decidado pri komunaj problemoj.” Sed, laŭ la deklaro, multaj infanoj estas malhelpataj ricevi elementan edukadon kiu uzas la lingvon kiun ili plej bone komprenas – nome, la gepatran lingvon. Rezulte, multaj tiuj infanoj, eĉ se ili povas trapasi la pordon de la klasĉambro, estas forfermitaj de egaleco de aliro kaj de persona evoluo.

El ĉiuj specialaj observoj de Unuiĝintaj Nacioj, la Tago de la Gepatra Lingvo plej forte kunligas la Esperanto-movadon, ĉar ĝi estas tiel proksime ligita same al la ideo de lingvoj por persona evoluigo kiel al lingvoj por demokratio. La mesaĝo de UEA estis vaste havebla en 19 lingvoj, kaj Esperanto-organizoj eldonis afiŝojn en ne malpli ol 34 lingvoj. Tiuj afiŝoj cirkulis kaj estis afiŝitaj tra la tuta mondo.



**Tago de la Gepatra Lingvo**  
21 februaro 2024  
HOMAJ RAJTOJ 75  
Ne estas justeco sen lingvaj rajtoj  
Per Esperanto ni subtenas ĉiujn gepatrajn lingvojn

Konstanta aserto en Esperanto-kunvenoj kaj en artikoloj en Esperanto estas la jena: “Kial, en la debato pri mondaj prioritatoj, oni dediĉas tiel malmultan atenton al la demando de lingvoj? Kial lingvoj ne ricevas emfazon en la Celoj por Daŭripova Evoluigo? Kial maljusta diskriminacio surbaze de lingvoj estas plejparte malatentata en debatoj pri homaj rajtoj?”

Parolante nome de ĉiuj neregistaraj organizoj dum la Festkunveno okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo 2024, reprezentanto de UEA apud Unuiĝintaj Nacioj prof. Francis M. Hult, en sia rolo kiel prezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj, diris jenon:

***“Niaj gepatraj lingvoj estas la semoj el kiuj kreskas niaj multlingvaj repertuaroj tra la tuta vivodaŭro dum ni celas elpaŝi en ĉiam vastiĝantanaron da medioj por edukaj, kulturaj, sociaj kaj ekonomiaj horizontoj kaj lernas la regionajn lingvojn, indiĝenajn lingvojn, naciajn lingvojn, mondajn lingvojn kaj internaciajn lingvojn kiel ekzemple Esperanton, kiuj malfermas pordojn al tiuj medioj. Ĉio komenciĝas per la gepatra lingvo, la alirejo al edukado, kultura esprimiĝo, civila partopreno, kaj justeco.”***

Profesoro Hult citis tutan liston de internaciaj interkonsentoj rilataj al lingvaj rajtoj, inter ili la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Internacia Pakto de Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, la Deklaro pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj, kaj la Deklaracio de la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. “Lingvaj rajtoj,” li fine konstatis, “estas fundamentaj al inkluzivo, egaleco kaj justeco.”

---

**Universal Esperanto Association Office for Liaison with the United Nations, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).**